

La Mondo, 1587



Esperanto sub la Suda Kruco

Julio-Aŭgusto 2000
Numero 46 (vol. 8, no. 4)



ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Numero 46 (volumo 8, numero 4), Julio-Aŭgusto 2000

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

☎: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

E-poŝto: donaldbroadribb@mac.com

Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson St Redfern, NSW 2016, Aŭstralio. E-poŝte:

libroservo@ans.com.au

Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towoomba Road, Oakey Qld 4401, Aŭstralio. E-poŝte: hazgreen@tmba.design.net.au

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elk-overtigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: “Ni vere bezonas artikolon pri ...?” Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Vi povas sendi vian kontribuon per e-poŝto, sur komputila disko (Mac aŭ MS-DOS [nur 3½"]), aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpita-jn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

La birdo kiu preskaŭ malaperis por ĉiam (Sylvan Zaft).....	3
Pri la manifesto de Raŭmo (Jouko Lindstedt)	4
Paul Desailly Raportas	8
Inda projekto por niaj fondusoj (Katalin Smideliusz)	9
Kiel libertempas la Esperantistoj? (Franciska Toubale)	9
Nia filmo	13
Priinterretaj informoj	14
Diversaĵoj.....	16
La diktatoreco de la Esperantaj vortaroj	18
Raporto pri la estrarkunsidoj de NZEA (Dennis Pease)	21
IEI (Atiullio Orellano Rojas; Jenny Bishop).....	22
El la Regionoj	24
La manifesto de Raŭmo	25
(Mia komentario) Odlo Bokserp26	

Recenzoj:

<i>Kio estas demokratio?</i> (D.B.).....	10
<i>Inkubus</i> (Terry Manley).....	12

English Supplement

ESK estas legebla per la Interreto: <http://www.poboxes.com/esk/>

Limdato por artikoloj por la julia numero: 18 aŭgusto.

Kovrilbildo: La tria kaj lasta mapo de la mondo desegnita de Abraham Ortelius; el 1587.

LA BIRDO KIU PRESKAŬ MALAPERIS POR ĈIAM

de Sylvan Zaft



Kalifornia kondoro

Ni piediradis laŭ la suda rando de la Kanjonego de la Rivero Colorado en la usona ŝtato Arizono. Tiun aprilan matenon la suno estis forta kaj mi portis du litrojn da akvo. Barbara sidis kelkminute dum mi marŝis al iu belvidejo. La Kanjonego etendiĝis pli ol 25 kilometrojn ĝis la norda rando. La egegaj malglataj ruĝaj rokoj kvazaŭmontris imagopovon superhoman.

Barbara ekriis: “Kia estas tia birdo?”

Rapide turnante min, mi supren rigardis al la birdo kiun ŝi fingromontras. Dum momento mankis al mi spiro. Jen la plej granda birdo de la tuta kontinento flugglisanta super niaj okuloj. La birdo larĝis je tri metroj. Granda ena parto de ĉiu nigraflugilo estis blanka. Dum kvin jaroj, de 1987 ĝis 1992, neniu simila al tiu flugis libere.

La kalifornia kondoro (*Gymnogyps californianus*) estas tre granda vulturo kies kvanto iom post iom malpligrandiĝis ĝis malpli ol dudek ekzistis. En 1985 oni decidis kapti la malmultajn vivantajn restantojn de tiu speco kiu en prahistoriaj epokoj flugis de la Atlantiko ĝis la Pacifiko. En la bestoĝardenoj en San Diego kaj Los Angeles oni bredis la malpli ol tridek transvivantojn.

Komencante per tiu eta kvanto da birdoj la bredistoj sukcesis pligrandigi la nombron ĝis hodiaŭ en tiuj bestoĝardenoj ekzistas iomete pli ol

cent. En 1992 oni komencis liberigi iujn kaj hodiaŭ iomete pli ol kvindek vivas kaj flugas en sovaĝejoj. Tiun tagon Barbara kaj mi vidis du el ili, proksimume 4% el la liberflugantaj Kaliforniaj kondoroj.


Ĉar tiuj tre grandaj birdoj bezonas vere vastaskalajn sovaĝlokojn oni liberigis ilin tie kie malmultaj homoj loĝas. La Kanjonego estas taŭga loko. La parko mem estas grandega. Ĝi enhavas preskaŭ 500 000 hektarojn.

Iuj el la liberaj kondoroj mortis. Tiun posttagmezon geparo de Montano rakontis al ni pri kamiono kiu mortfrapis unu en ilia ŝtato. Kelnero en bona restoracio ĉe la Kanjonego rakontis al ni pri viro kiu kontraŭleĝe portis pafilon ie en la parko. Tiu ulo vidis larĝegan birdon flugantan al li. La pafilportanto ektimegis kaj instinkte mortpafis la maloftaĵon. Kiam li konsciis pri tio, kion li faris, li konfesis al la polico.

Iuj birdoj ne sukcesis en la libera vivo. Ie apud la Kanjonego estas malgranda flughaveno. Ekster la oficejo situas benko. Unu tagon kondoro flugis tien kaj sidis sur la benko. Dum la tuta tago ĝi simple sidis tie dum homoj eniris kaj eliris. Kiam la estro de la loko decidis iri hejmen li timis ke la kotoj atakos kaj mortigos la sidantan birdon. Tial li levis la birdon kaj portis ĝin en la oficejon, kie ĝi tranoktis. Je la sekva mateno la estro trovis metalan etiketon kun telefon-numero alligitan al unu flugilo. Li telefonis kaj raportis la eventon. Post iom da tempo naturalistoj alvenis por veturigi la birdon al bes-

toĝardeno en Kalifornio. Tiu birdo ne taŭgis por la libera vivo. Oni povis breedi ĝin en mallibero.

Malgraŭ tiuj malsukcesoj, iuj el la grandaj birdoj flugas super sovaĝejoj kaj trovas manĝaĵojn kaj, ni esperu, faros nestojn kaj havos idojn. En kavernoj ĉe la Kanjonegaj klifoj oni trovis fosiliajn ostojn de praaj grandaj bestoj. Oni rezonas ke tre

grandaj birdoj alportis ilin tien kie ili manĝigis siajn idojn. La Kalifornia kondoro plenkreskas je la aĝo de kvin ĝis sep jaroj. Nur tiam la ino demetas unu ovon. La gepatroj prizorgas la idon dum pli ol jaro. Oni esperas ke en la venontaj jaroj refoje plenkreskulaj kondoroj nutros idojn en tiaj Kanjonegaj kavernoj. 

PRI LA MANIFESTO DE RAŬMO

de Jouko Lindstedt

Ĉi tio estas provo rigardi la Manifeston de Raŭmo en ĝusta historia perspektivo.¹ Bedaŭrinde, pro mia persona historio mi estas malbone preparita por tia objektiva rigardo: unufanke, mi estis la kunverkinto de la Manifesto (kun Giorgio Silber) kaj ĝia unua subskribinto, aliflanke mi estis dum la lastaj jaroj ne unufoje publike atakata de kelkaj tiel nomataj raŭmismoj, kaj ankaŭ mi mem publikigis kelkajn polemikajn analizojn pri ili. La leganto estu do avertita: ĉi teksto eble ne estas tiel objektiva, kiel ĝi celas esti.

Kion la parolantoj de la lingvo Esperanto volas? Dum la unuaj tempoj la respondon formulis plej ofte Zamenhof mem, ekzemple en la grava teksto “Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia” (1900). La plej grava dokumento de la komenca periodo estis tamen “Deklaracio pri la esenco de la Esperantismo”, la tiel nomata “Bulonja deklario”, akceptita en la unua internacia kongreso en 1905.

La Bulonja deklario komenciĝas per “Esperantismo” kaj finiĝas per “Esperantisto”. La unua punkto difinas: “La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa”. La lasta, kvina punkto diras: “Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas.” Iom surprize do, “Esperantisto” ne estas difinata kiel adepto de la “Esperantismo”, sed nur kiel uzanto de la lingvo. Por samtempuloj tio eble ne estis kontraŭdiro: kial oni uzu tiun novan lingvon kun ankoraŭ malmulta literaturo, se ne pro ideo konvinkiteco, se ne por disvastigi ĝin? Tamen en tiu duobla difino de la Bulonja deklario enkaŝiĝas jam la kontrasto inter la Esperantaj “movado” (kies ideologio estas la “Esperantismo”) kaj “komunumo” (kiu konsistas el la parolantoj de la lingvo).

La movado kaj la komunumo estas la du ekzistomanieroj de Esperanto. Ili kompletigas unu la alian, kaj inter ili ne estas esenca kontraŭdiro; tamen, en la mensoj de la Esperantistoj jen unu, jen alia aperis pli grava, pli valora, aŭ eĉ la sola subteninda, kaj

¹La tekston de la Manifesto de Raŭmo vi povas legi sur paĝoj 25-56 de ĉi tiu numero de *ESK*. — Red.

de tio devenis ideologiaj disputoj.

La plej videbla tavolo de la Esperanta komunumo estas ĝia originala kulturo. La interesa afero estas ke Esperanto ne estis kreita por naski tiun kulturon — almenaŭ ne eksplicite, almenaŭ ne oficiale. Denove kaj denove oni proponis Esperanton kiel neŭtralan komunikilon inter popoloj kaj kulturoj jam ekzistantaj. Se ĝi havos literaturon, ĝi konsistos el “tiuj verkoj, kiu havas egalan intereson por ĉiuj popoloj” (Bulonja deklaro) — do, ĝi peros mesaĝojn kaj librojn de unu popolo al alia. Ĉi tiu perisma kaj utilisma aliro ripet-iĝas en pluraj ideologiaj tekstoj dum la unuaj jardekoj.

Apud ĉi tiu oficiala motivigo de la lingvo estis kreata originala literaturo, kiu neniel estis derivebla el tiu motivigo. Kaj ekde la komenco mem: jam la *Unua Libro* de 1887 enhavis du poemojn de Zamenhof: “Mia penso” kaj “Ho mia kor”. Ĉar ni jam kutimiĝis al la ekzisto de la originala Esperanta literaturo, ni ne plu konscias kiaj strangaĵoj tiuj versaĵoj estis: Oni proponas al ni tutan lingvon kiel facilan kaj utilan perilon inter popoloj, sed samtempe ankaŭ du lirikaĵojn en kiuj la aŭtoro mem de la lingvo malkaŝas siajn personajn emociojn. La poeto kvazaŭ legas siajn poemojn al malplena salono: tie sidas neniu kiu povus kompreni liajn intimajn versojn. Post la legado regas nur silento.

Sed tamen, post kelka tempo iom post iom la salono komencas pleniĝi..

Kompreneble, plej multaj originalaj verkoj dum la unuaj jardekoj estas nelertaj, naivaj, ofte supraĵaj. La originala Esperanta kulturo atingis altan artisman nivelon nur inter la du mondmilitoj. Kaj tiam oni la

unuan fojon povis diri ke Esperanto atingis ian valoron, eĉ se ĝi neniam iĝos mondlingvo. Kompreneble, tiuj atingiĝoj estas klarigeblaj nur per la tuthomara idealo kiu inspiris la verkistojn. Sed tamen okazis ke Esperanto unue atingis ion kion ĝi ne unuavice celis.

Mi rigardas la Esperantan kulturon kiel “emerĝan” fenomenon. Tio signifas: la movado por la lingvo kreis ĝin, celante krei ion alian; kaj poste tiu nova fenomeno komencas retrokuple influi sian kreinton, la movadon. Ekzistas multaj fenomenoj en la mondo kiujn oni povas nomi emerĝaj. La homa konscio estas tia: en certa stadio de la evoluo la elektrokemia funkciado de la homa cerbo estigis konscion, kiu ekde tiam influas la homon mem, tiel ke tiu ne plu estas subigita nur al siaj instinktoj. Tamen, la cerbo neniam “celis” iĝi konscia. Inflacio estas emerĝa fenomeno: ĝin kreas la normala agado de multegaj ekonomie aktivaj homoj, el kiuj neniu “deziras” krei inflacion.

Depost la emerĝo de la originale Esperanta kulturo, la komunumo ricevis sian voĉon apud tiu de la movado.

Multajn nuntempajn esperantistojn povas surprizi ke ankaŭ Universala Esperanto-Asocio estis kreita, ĉefe de la juna Hector Hodler, por organizi ĉefe la komunumon, ne la movadon. “La celo de la Asocio estas la plifaciligado de ĉiuspecaj rilatoj inter diverslingvanoj kaj la kreo de fortika ligilo de solidareco inter la membroj”, diris la unua statuto de 1908. Neniu punkto en la statuto diris ke la celo de UEA estis disvastigi Esperanton! Kompreneble, ju pli multaj homoj parolus Esperanton, des pli bone UEA povus realigi siajn idealojn; sed la

“propagando”, kiel oni tiutempe probable dirintus, ne troviĝis inter la difinitaj celoj.

Ekde la komenco UEA do estas sufiĉe “raŭmisma” organizo, kiel Renato Corsetti emfazas. Tamen, post la dua mondmilito, speciale dum la periodo de Ivo Lapenna, la publikan bildon de la asocio formis streboj, kaj partaj sukcesoj, por akiri oficialan rekonon de la lingvo ĉe Unesko kaj aliaj internaciaj organizoj. Certe ne mankis aktivuloj kiuj vidis en tiu “ekstera politiko” la solan valoran agadon de Esperantistoj, kvankam la kultura kreado kompreneble neniam ĉesis — pensu nur pri la mejloŝtono *La Infana Raso* de Auld.

La nova socia engaĝiĝo de la okcidenta junularo dum la sesdekaj jaroj ne preterpasis la junularon Esperantan. La deklaro de Tireso (1969) aliĝis al la ĝenerala batalo kontraŭ imperiismo, nomante la imperiismon lingvan kiel sian ĉefan malamikon. TEJO estis difinita kiel “organizaĵo laboranta por forigo de ĉia misuzo de lingvoj por ekonomia, kultura aŭ politika subpremado”. Tiel ankaŭ la junulara movado koncentriĝis al sia “ekstera politiko”, kvankam ne precize en la maniero de Lapenna.

Historie oni povas rigardi la Manifeston de Raŭmo kiel “kontraŭ-Tireson”: ĝi inaŭguris la individuisman novan jardekon kaj estis subtenita de junuloj kiujn frustris la magraj atingoj de la socia engaĝiĝo de la sepdekaj jaroj. Sed estus malĝuste difini ĝin pro tio kiel ion negativan: efektive estis “liberiga” sperto por multaj pensi ke oni rajtas fari diversajn aferojn per Esperanto sen senti sin devigita reklami kaj propagandi ĝin. (Parenteze, evidente

ofte estus bone por Esperanto, se kelkaj el ĝiaj plej fervoraj disvastigantoj iĝus “raŭmistoj” kaj eksilentus, prefere ol okupiĝi pri nekredeble mallerta argumentado...)

Rilate la distingon inter la movado kaj la komunumo, la historia rolo de la Manifesto de Raŭmo estis reaserti la rajton de la komunumo ekzisti samrajte kun la movado. Jam pro tio la nuntempa ideo fondi novajn, “raŭmismajn” organizojn estas misa — se oni provas organizi la komunumon, ĉu per asocioj, ĉu per paktoj, oni nur kreas novan movadon.

La aŭtenta komunumo, malfermita kaj sin-rekrea, ĉiam eskapos tiajn provojn.

Estas grave distingi inter la Manifesto de Raŭmo kaj la nuntempa “raŭmismo” kiu ofte baziĝas sur intenca forgeso de partoj de la Manifesto. La Manifesto estis multe pli proksima al la tradiciaj valoroj de la movado. Indas citi el ĝi:

3. Niaj celoj: “Ni celas disvastigi Esperanton por pli kaj pli, iom post iom realigi ĝiajn pozitivajn valorojn:

- a) propedeŭtiko por lingvoinstruado;
- b) kontaktoj inter ordinaraj homoj;
- c) kontaktoj sendiskriminaciaj;
- ĉ) novtipa internacia kulturo”.

Lige kun la lasta valoro, ni emfazas ke la serĉado “de propra identeco igis nin koncepti esperantistecon kvazaŭ la apartenon al mem elektita diaspora lingva minoritato. La kresko de niaj fortoj kaj la aliĝo de novaj homoj estas nepre kondiĉitaj de la konsciigo pri tiuj ĉi valoroj”.

Do, kiel la celo, estas efektive unue menciita la disvastigo de Esperanto — pli eksplicite ol en la statuto de

UEA de 1908! El la pozitivaj valoroj nomitaj, b) kaj c) estas tre proksimaj al la “pracelo” de “neŭtrala kaj facila interhoma komunikilo”. (Tion mi povas nun konfesi, estante verŝajne la inventinto de la vorto “pracelo”...) La Esperantistaro estas prezentata kvazaŭ mem elektita diaspora lingva minoritato — sed nur lige de la kvara valoro (kiu estas pli “komunuma”, dum la antaŭaj estas pli “movadaj”), kaj kun la grava vorto *kvazaŭ*, kiun la “raŭmistoj” nuntempe sisteme forlasas. Tipa ekzemplo de metaforo kiu nun iuj prenas kiel realan aserton!

La Manifesto enhavas ankaŭ apartan ĉapitron pri “La kongresoj kiel vojo al kresko” — tio povas surprizi tiujn kiuj nuntempe vidas sisteman nepartoprenon en UK kiel la plej superan ateston pri “raŭma vojo”.

Kiel mi do nun pritaksas la Manifeston, post dudek jaroj? Ĝia pozitiva atingo estis la eksplicita deklaro ke la komunumo estas egale grava kaj prava kiel la movado, kaj ke ne ĉiuj Esperantistoj bezonas esti disvastigantoj de la lingvo. Ke tian deklaron oni bezonis, pruvis la fakto ke oni dum jaroj ne aperigis la Manifeston ekzemple en la revuo *Esperanto*, sed diversmaniere prisilentis ĝin. Io, kio nun aspektas sufiĉe normala, aspektis ankoraŭ tiam tro radikala por iuj.

Kiaj estas la eraroj de la Manifesto? Mi vidas unu grandan kaj unu malgrandan:

* Ĝi subtaksis la minacon kiun la Angla lingvo kaj la konsumisma kulturo ligita al ĝi prezentas al ĉiuj homaj kulturoj — inkluzive tiujn de la Anglalingvaj landoj mem, kiujn plagas unulingva kultura fermiteco.

* Ĝi disvastigis la science nepruvitan aserton pri la propedeŭtika valoro de Esperanto kiu, bedaŭrinde, restas nepruvita ankoraŭ dudek jarojn poste (vidu <http://ourworld.com-puserve.com/homepages/profcon/eu-proped.htm>).

Fine, eble estis eraro paroli pri “diaspora lingva minoritato”. En 1980 ĝi aspektis kuraĝa metaforo, per kiu oni povas ludi pensante iom romantikeme ke eble ĝi iumaniere estas eĉ vera. En la tuta kunteksto de la Manifesto ĝi ne aspektis tiom misgvida... sed certe almenaŭ mi ne povis antaŭvidi ke iu iam provos konstrui tutan novan Esperanto-ideologion ĉefe sur tio, kaj nomos ĝin “raŭmismo”. Mi ne estis tiel feliĉa kiel Marx, kiu ne bezonis ĝisvivi la Sovet-Union de la tridekaj jaroj.

Jen do estis mia historia enkonduko en la Manifeston de Raŭmo. Ĝi celas esti ankaŭ elkonduko: la Manifesto tute ne estis tiel radikala, kiel tiam kredis kaj ĝiaj farintoj kaj ĝiaj kontraŭuloj, kaj ni ne plu bezonas ĝiajn ekzaktajn vortumojn por krei Esperantan kulturon — aŭ por disvastigi Esperanton.

Lahti, 1-2 junio 2000
[Laŭ BJA-LISTO@Helsinki.Fi] □

“Ah, kiaj moroj...” nova Ruso plendas al la filo. “Ĉu oni povas bone elekti edzinon per komputilo!”

“Sed kiel vi, paĉjo, renkontiĝis kun panjo?”

“Nu, mi honeste gajnis ŝin en kartludo.”

PAUL DESAILLY RAPORTAS



28/5/2000:

Mia rolo en nia Oceania Iniciato antaŭ kvar tagoj en Apia kaj Pago Pago finiĝis, sed la afero ankoraŭ daŭras en

Nov-Zelando. Mi lasas liston de nomoj kun Bradley McDonald, temas pri la nomoj kaj adresoj de proksimume dudek komencantoj en la du Samooj. Generale ili volas lerni laŭ la propra rapideco.

Parolante honeste, mi agnosku ke la plejmulto el ili ŝajnas esti subtenantoj de la ideo Esperanto, tamen estas kelkaj seriozaj studantoj.

Aldone, en Apia ni nun havas kiel instruiston de Esperanto tre kleran poligloton, Wendy Percival, kiu diplomigis en Usono pri Latin-Amerikaj Studoj. Bonega stoko da lernolibroj, kaj eĉ *Mazi*, nun troviĝas en ŝia moderna hejmo. Ŝiaj prononc-maniero de la I. L. kaj spertoj kiel instruisto superas la miajn. Ŝi jam per intensaj privataj lecionoj de Esperanto fakte estas bonega instruisto.

Grava nova afero kuŝas en tio ke la Ĉefo de la Anglalingva fako de la Nacia Universitato de Samoo, D-ro Sina Vai, ĵus invitis nin fari dek-minutan paroladeton pri la Esperanto-movado. Antaŭ ses semajnoj Marco Kappenberger prezentis min al ŝi, kaj fine post kelkaj instigoj ŝi cedis. La invito validos post kvar semajnoj.

Pro multaj kialoj ne eblas ke mi restu tiom longe sen enspezo, do estas ege agrabla afero ke nia nova instruisto, Wendy, reprezentos nian movadon kaj dece kaj inteligente. Ni rajtas fieri.

Oni rajtas demandi kial mi subite

sudeniris sen interkonsiliĝo aŭ konsultado. Vere mia respondo ne estas komplikita. De tempo al tempo en la insularo la telefonlineoj ĉiuj ne funkcias.

Dum almenaŭ kvar tagoj ne eblis al mi havigi rekte monon el mia banko, ĉar ĉiuj komputiloj kun ligoj al Aŭstralio kaj Nov-Zelando ne plu funkcias. Sama estis la situatio rilate al alligo al Interreto. Eble la sama problemo ankoraŭ ekzistas.

La 19an de majo mi faris paroladon pri la lingva demando. Oni sur paĝo 2 de la *Samoa Observer*, kaj eĉ per radioreklamo anoncis la programon. Bedaŭrinde, nur ses aŭskultantoj venis, kaj nur unu el ili esprimis deziron lerni Esperanton. Temas pri juna viro kiu estas spertulo pri komputiloj. Shannon kaj Wendy volas samtempe instrui unu la alian respektive pri komputiloj kaj Esperanto. Efektive, mia rolo ne plu necesis en Okcidenta Samoo.

Nun mi volas paroli pri mia agado en Usona Samoo. La 8an de majo mi ekinstruis Esperanton al naŭ komencantoj. Ĉiuj sufiĉe diligente komencis. Tri longaj intensaj lecionoj okazis; la nivelo kaj rapideco surprizis min. Ne ni uzis plumon, sed ĉiuj bone aŭ sufiĉe bone progresis. Ili ĉiuj estas muzikistoj aŭ muzikamantoj. Mi instigis ilin veturi al Apia por vidi *Mazi*-n., kaj mi proponis al miaj lernantoj en Apia ke ili iru al Pago por aŭskulti *Jen Nia Mondo*-n. Espereble Wendy kaj Ali, kiu estas la plej elstara studento en Pago, interŝanĝos ideojn kaj rimedojn por antaŭenigi nian movadon.

Entute, mi ĝis nun pasigis 54 tagojn en Oceanio. □

INDA PROJEKTO POR NIAJ FONDUSOJ de Katalin Smideliusz

Mi legis en la aprila numero de *Even-toj* ke vi atendas ideproponon kiel elspezi en la Aŭstralia asocio la akumuliĝintan sumon \$170 000. Eble mi povas helpi al vi trovi agadkampon kiu nepre bezonas monon kaj kies apogo estus inda kaj nobla faro ankaŭ viaflanke. Des pli ĉar la projekto nun ege bezonas monon por plua agado.

Mi de pli ol unu jaro kunlaboras en la projekto **INDIĜENAJ DIALOGOJ**, kaj faras tion entuziasme anakŭ Atilio. En tiu grandioza projekto ni trejnais indiĝenojn por ke ili havu komunan lingvon, kompreneble Esperanton kaj modernajn komunikrimedojn.

La celo de la projekto estas trejni reprezentantojn de 250 minoritataj popoloj antaŭ la jaro 2004. Ĝis nun havis tian preparon 33 partoprenantoj el multaj partoj de la mondo, ili nun sukcese uzas Esperanton kaj konstruis ligon inter si.

La projekto planas partoprenigi ankaŭ Aŭstraliajn indiĝenojn, kaj ankaŭ pro tio mi pensas ke vialanda asocio eble volonte kontribuas. Vi povas legi pliajn informojn sur la paĝoj de *Esperanto* decembro 1999, aŭ en la lastaj numeroj de *Internacia Pedagogia Revuo*. Pluraj samideanoj ankaŭ de via asocio kunlaboras kun ni por helpi la agadon. Informojn povas doni: Jennifer Bishop, Margaret Furness, Franciska Toubale.

Mi petas vin infromi min pri ĉu vi vidas eblon ke ni kunlaboru por eventuala subvencio, kaj se jes kion ni faru, en kiu formo tio devos okazi. Mi petas ke vi infomu ankaŭ la ĉeforganizanton de la projekto Sylvain Lelarge, <sylvain.lelarge@usa.net>, kiu

povas doni al vi pli da detaloj kaj informoj.

Atendante vian pozitivan respondon elkore salutas vin :

KIEL LIBERTEMPAS LA ESPERANTISTOJ?

de Franciska Toubale

Ĉiujare dum Pasko mi ŝatas ĉeesti la Nacian Popolan Festivalon en Kanbero.

Tie eblas muziki kaj danci laŭ la tradicio de multaj etnoj, aŭskulti aŭ deklami poezion, debati pri aktualaj sociaj aŭ politikaj temoj, partopreni en fabrikado de manfaritaj artaĵoj k.t.p. La homoj volonte alparolas unu la alian. La amika etoso memorigas min pri Esperanto-kongreso. Mi konstatis ĉijare ke ne nur mi tion opinias, ĉar mi renkontis ses aliajn Esperantistojn. Neatendite aldoniĝis la plezuro babilu Esperante aŭ paroli pri Esperanto al la scivolemuloj kiuj aŭskultis nin.

Unu ero de la festivalo vere ĝojigis min. Ĝi okazis je la fina koncerto.

Enirante la koncert-halon, ĉiu ricevis kandelon. Poste alvenis grupo de blanke vestitaj homoj kiuj portis la flamon de Paco. La ideo naskiĝis en Aŭstralio. Same kiel la Olimpia flamo, ĝi vojaĝas en speciala ujo de lando al lando. Dum junulino kantis en Sanskrito, ŝiaj akompanantoj ekbruligis la malgrandajn kandelojn de la ĉeestantaro.

Nun ĉiu havas la taskon ekbruligisian kandelon dum du minutoj ĉiun tagon, pensante pri paco kaj transdoni la flamon al kiel eble plej multe

da homoj. Por estingi la flamon ne konvenas forblovi ĝin — blovo estas la simbolo de vivo; premo de la meĉo per la polekso kaj la montrifingro sufiĉas.

Mi ŝatis tiun ceremonion kaj ne dubas ke ĉiutaga mallonga meditado pri la Paco pacigas la menson kaj instigas la disvastigon de paca etoso. □

KIO ESTAS DEMOKRATIO?

recenzas Donald Broadribb

Takso: ●●●●●

David Beetham kaj Geoffrey Sutton: *Kio estas demokratio?* Tr. Geoffrey Sutton. (Originala Anglalingva eldono: *Introducing Democracy: 80 Questions and Answers*, © UNESKO 1985.) Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2000. 143p., broŝ.

La aŭtoroj estas Britoj: David Beetham estas Profesoro pri Politiko en la Universitato de Leeds; Kevin Boyle estas Profesoro pri Juro en la Universitato de Essex.

Ĉi tiu libro estas interesa, pensiga, kaj por politike interesata persono leginda. Ankaŭ tendenca. Antaŭsupozate estas ke plej gravas kaj dezirindas la “reprezenta sistemo” de demokratio nun plej populara en la demokratiaj landoj; kaj la “libera merkato” (t.e. kapitalismo) kiel la ekonomia sistemo plej taŭga, eĉ necesa por “reprezenta demokratio”. Do, ke ĉiu formo de socialismo estas pro si mem almenaŭ neamika al vera demokratio.

“Reprezenta demokratio” estas tiu speco de demokratio en kiu, laŭ plurpartia sistemo, oni libere elektas parlamentanojn, kaj rekte aŭ nerekte ankaŭ Prezidenton aŭ Ĉefministron. (La aŭtoroj opinias, tamen, ke en la plej pura formo de demokratio oni devas rekte elekti Prezidenton.)

Kelkrilate la aktualaj okcident-eŭropaj landoj, Usono, kaj Aŭstralio

(ŝajne + Nov-Zelando) modelas, por la aŭtoroj, veran nuntempan demokration: parte ĉar ili havas skribitajn konstituciojn (malsimile al Britio), kaj parte ĉar la tuta Parlamento estas elektata (ankaŭ malsimile al Britio).

Usono, tamen, ne estas pura modelo, ĉar en ĝi la civitanoj ne rekte elektas la Prezidenton.¹

Malgraŭ siaj tendencoj, la verko tre valoras kaj por “evoluantaj landoj” por kiuj demokratio estas io nova; kaj por la “evoluintaj” landoj kie demokratio jam havas longan, stabilan historion. Civitanoj de ambaŭ specoj de landoj povas trovi la diskutojn valoraj kiam necesas baloti en referendumoj, aŭ kiam — ekzemple en Aŭstralio — oni elektas la *tutan* parlamenton pro plurfoja malakordo inter la ĉambroj de la parlamento pri grava leĝpropono.

Interesa, kaj valora, diskuto temas

¹Tiu atentigo eble surprizas Aŭstralianojn kaj Nov-Zelandojn, sed efektive en Usono la adoltaj civitanoj balotas por membroj de *Elektita Kolegio*, kiuj siavice elektas la Prezidenton. En kelkaj cirkonstancoj, la Domo de Reprezentantoj elektas la Prezidenton. Tio okazis kiam ĝi elektis Prezidenton Thomas Jefferson, en 1800. Pli aktuale, la Domo de Reprezentantoj elektis Prezidenton Gerald Ford, en 1974. Gerald Ford estis la sola Usona Prezidento neniam publike porbalotita kiel Prezidento. — Red.

pri la metodoj de elektado: la sistemo plej ofte uzata en, ekzemple, Usono kaj Britio, kaj populare nomata la “Sistemo de Unua Post la Fosto”. Tiu nomo venis el ĉevalkonkursoj, laŭ kiuj tiu ĉevalo kiu la unua pasas la finfoston venkas. En elektoj tiaj, venkas la kandidato kiu akiris la plej multajn voĉdonojn, eĉ se pli multo de la voĉdondantoj ne balotis por ŝ/li. Ekzemple, se Kandidato A ricevis 33% de la voĉdonoj, Kandidato B ricevis 37%, kaj Kandidato C ricevis 30%, Kandidato B venkas kaj aŭtomate elektiĝas.

Diversaj sistemoj de la Sistemo de Prefer-Balotado ekzistas. En Aŭstralio ni uzas sistemon laŭ kiu ĉiu balotanto indikas la ordon de siaj preferoj pri la diversaj kandidatoj. Laŭ iom kompleksa kalkulado, tiu kandidato kiu ricevis la plej multajn preferojn estas elektita.

La sistemo de Proporcio Repraŭzentado, ankaŭ uzata i.a. en Nov-Zelando kaj (por la Senato) en Aŭstralio, devigas la balotanton fari egalajn voĉdonojn por pluraj kandidatoj, kaj tre kompleksa kalkulsistemo certigas ke ankaŭ kandidatoj de minoritataj partioj estas elektataj.

Laŭ la aŭtoroj, tre grave estas ke

(1) la skribita konstitucio ne estu ŝanĝebla sen rekta aprobo fare de la adolta civitanaro;

(2) ke la registaro estu dividita en tri sendependajn partojn: la ekzekutivo (ekz. la Prezidento), la Parlamento, kaj la Juĝistaro, tiel ke neniu el ili povas diktatori;

(3) ke voĉdonado devas esti “sekreta”, t.e. ne kontrolebla fare de alia(j) persono(j), tiel ke ĉiu balotanto povas sentime voĉdoni laŭ sia deziro.

Ĉu aŭ ne balotado estu deviga (kiel en Aŭstralio) aŭ nedeviga (kiel en la

plej multaj demokratiaj landoj) estas interese diskutite de la aŭtoroj — ili preferas nedevigan balotadon.


Aliaj specoj de vera demokratio estas nur menciitaj, sen detala diskuto, ekzemple demokratio laŭ kiu ĉiu adolta civitano rekte voĉdonas pri leĝproponoj kaj decidoj (kiel en klasika Ateno, en Grekio; kaj kiel en Svislando nuntempe).

“Demokratia socialismo” ne estas detale diskutita en la verko, kaj ŝajnas ke la aŭtoroj ne opinias ke ĝi povas ekzisti kiel vera demokratia sistemo.¹


La aŭtoroj argumentas ke la ekzisto de nevorviŝeblaj homaj rajtoj estas nepre necesa por vera demokratio.

Pluraj aliaj temoj — kelkaj ankaŭ tre gravaj — estas diskutitaj en ĉi tiu verko. Ni gratulas al UEA ke ĝi eldonis Esperantlingvan tradukon. □

¹Ne konfuzu tion kun la “komunismaj” kaj pseŭdodemokratiaj sistemoj kiuj sin nomas demokratiaj, sed efektive estas diktatoraj reĝimoj aŭ, ofte, oligarkioj (ekz. la aktuala Ĉinio, en kiu malgranda grupo da homoj diktatoras).—Red.



RECENZO PRI INCUBUS de Terry Manley



*Recenzo pri **Incubus**, la filmo en Esperanto en kiu rolas William Shatner.*

Eble la sekvonta impresado ŝajnas tro antaŭjuĝema kaj subjektiva laŭ kritikista vidpunkto sed ĝi estas

mia impresado...

Strange ke mi ne antaŭsciis iomete per la titolo. Se oni kontrolas “incubus” en vortaro oni konstatas ke ĝi signifas “inkubo” aŭ “koŝmaro” en Esperanto. Kial mi atendis filmon pri eksterteruloj? Ĉu nur ĉar Shatner estas plej fama pro sia rolo kiel Kapitano Kirk en *Star Trek*? La filmo indas sian nomon. Ĝi ja estas inkubo. Se ĝi estus en iu alia lingvo ol Esperanto mi tre dubas ĉu mi finspektus ĝin. Mi ne opinias ke terurado estas taŭga distraĵo. Mi ne elektas havi koŝmaron. Mi preferas ne.

Kial oni elektis produkti filmon tian en Esperanto eskapas min. Mi ne konas la ligan inter la filmtemo kaj Esperanto.

Ĝi komenciĝas interese per la listigo de la filmlaboristoj uzante Esperanton. Kaj kiam la rolantoj komencis paroli Esperanton (ne kutima afero), tio interesis min.

Ĉar la subteksto ne vere estas sube — ĝi estas nur iomete sub la mezo de la ekŝrango — estas malfacile ne legi dum oni spektas la filmon. Tial mi, kiel Anglalingva parolanto, ne bone rimarkis la mankon de bona Esperanto de tempo al tempo.

Foje la prononco estas sufiĉe klara, sed ofte estas misprononcoj (“s” anstataŭ “ŝ”, “g” anstataŭ “ĝ”, mi rimar-

kis). Iu notis Francan influon, ĉar estas manko de prononco de “s” ĉe la fino de “estas” fojfoje, kaj aliaj misdiraĵoj. Foje la signifo ne estas ĝusta, — “akurata” anstataŭ “ĝusta”, kaj aliaj. Foje la diro estas tro rapida kaj neklara. Mi dubas ĉu mi komprenus la diritaĵon se la “mezteksto” ne aperus.

Se mi povus arte kritiki sen antaŭjuĝo, eble mi rimarkus ke la aktoroj bone rolis kaj ke la temo povus reprezenti la luktegon inter la povoj de Mallumo kaj la povoj de Lumo (aŭ en ĉi tiu kazo la preĝeja Dio). Ĉu mi subjektive juĝas ĉar mi ne deziras agnoski la daŭron de tiu aĉa kredo, kie la “fratinoj de Mallumo” servas la viron Diablon kaj fortentas noblajn virojn per sekso, kaj tiel povas murdi ilin kaj kondamni ilin al infero?

Filmo kun scenoj de vespertoj diablaj, inkubo el la mallumo, palisoj kiel mortigiloj, rita seksintenco pere de la diablo, kaj murdistoj vere malinteresas min.

Eble mi iomete interesiĝis pri la lingva angulo de la filmo kaj povos turmenti min per alia spektado por pli bone kontroli la lingvon, sed mi eĉ pridubas tion.

[El *Telopeo*, majo 2000]

Noton pri kie trovi la vidbendon de ĉi tiu filmo oni povas legi en ESK januaro-februaro 2000, p.16. — Red. □

Nova Ruso kontrolas la hejmtaskon de la filo.

“Kiom estas duoble du?”

“Sep”, respondas Peĉjo.

“Ne sep, sed kvar...”

“Mi ja scias, sed estas deziro iom marĉandi.”

Nia Filmo



El la Somerkursaro en januaro— de maldekstre: profesia pupludisto Dennis Murphy, ĝastinsruisto Lee Jung-Kee, kaj Koreaj visitantinoj.
El Heroldo de Esperanto



Kamioneto dum ekspozicio en Suda Aŭstralio

PRIINTERRETAJ INFORMOJ

de via Redaktoro

Rapide ŝanĝiĝas la situacio en la Interreta mondo. Kiam nova numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* aperas, jam malnovaj kaj ne plu validaj estas kelkaj priinterretinformoj en ĝi.

- **Macintosh:** Jen la nunmomenta situacio (17 junio 2000): la nova, “provizora” formo de Netscape 6 nun ebligas legi unikodajn tekstojn per la Esperantaj literoj. Esperantaj unikodaj literoj estas uzataj por la komputilsistemaj litertipoj en sistemoj 8.5, 8.6. kaj 9. Do se vi elektas “Unicode” en la tiparmenuo de Netscape 6, via komputilo aŭtomate ĝuste vidiĝas la Esperantaj literoj sur unikod-retpaĝoj.

Aliflanke, iCab 2.0 ankoraŭ ne ebligas uzi unikodon, sed plu ebligas legi per Latino-3 (nun per la kodelekto “user defined”).

Netscape 4x permesas legi Esperanton per Latino-3. Kompreneble, por uzi Latino-3-n per aŭ iCab aŭ Netscape necesas uzi Latino-3-an alfabeton Esperantan (haveblan ĉe la redakcio de *ESK*).

- **Esperantaj gazetoj per la interreto:** ĉe <<http://www.esperanto.se/virtuala/gazetoj.html>> oni trovas tre utilan liston de Esperantaj gazetoj legeblaj per la interreto. Unu el la plej interesaj el ili estas la satira revuo *Male*. Jen specimena “raporto” el tiu revuo:

Ŝanĝas nomon por sekvi la evoluon

La 1-an de januaro 1999 Marko Lins, Franko Luin kaj Marko Rauhamaa anoncis en komuna gazetara konferenco, ke ili ŝanĝas siajn no-

mojn al Eŭro Lins, Eŭro Luin kaj Eŭro Rauhamaa. Dum transira periodo ambaŭ nomoj estos uzataj paralele (la novaj nomoj nur en elektronikaj medioj), sed post du jaroj nur la novaj nomoj estos oficialaj.

Helmar Frank, kiu ne estis invitita al la konferenco, informis telefone ke ankaŭ li intencas ŝanĝi sian nomon, sed al Helmar Eŭr. Mark Fettes, loĝanta ekster la Eŭropa Unio, ne sentas ian devon sekvi la ekzemplon de la Eŭropaj samideanoj kaj plu retenas sian nomon senŝanĝe.

La skribanto de la artikolo, kvankam loĝanta en Eŭropo, sentas sin skeptika al la tuto (jam la finaĵo **us** en Markus indikas tion) kaj skuas sian kapon, kiel ĉiam, kiam li nenion komprenas. Iuj diras ke tio okazas konstante.

[Markus, ne Eŭrus] □

- **“Aktualajoj pri lingvoj, scienco kaj nova teknologio”.** [Ni represas la ĉisekvan tekston nekorektita, por doni la guston de la nova retinformejo. Ĝin disponigis la informejestro Ricardo Carrillo:]

En la retpaĝo <http://abeja.go.to> ni lanĉis novan rubrikon kun la temo “Aktualajoj pri lingvoj, scienco kaj nova teknologio”.

Ni proponas al vi ĉi tiun novaĵan servon, ni esperas ke vi ĝuos ĝin.

Jen la nunaj kaptitoloj:

- La Tero, Kies Tagon Ni Festas Ĉi Semajne, Estis Fotata Per Fotilo En Spacŝipo

Ili estas la unuaj kaj plej malkaŝigaj tridimensiaj bildoj iam konataj de la homo. Ĉitempe, kiam la mondo festas la Tagon de la Tero, la tridi-

mensiaj bildoj de la plej precizaj landkartoj iam faritaj de la homo montras ĉi tiun hejmon kie ni loĝas, preskaŭ 6 mil milionoj da homoj. Per ĉi tiuj bildoj, la esploristoj kaptis la plankon, tektonikajn platojn, ...

- Du Novaj Planedoj Eniras Scenen

Astronomaro el Usono eltrovis pasintsemajne du novajn planedojn ekster la suna sistemo. Ĉi tiu trovo, kiu pliigas la nombron pri konataj planedoj ĝis 34, konfirmis la eblan ekzistadon pri aliaj mondoj, certigis la sciencistoj Geoff Marcy kaj Paul Butler, eltrovintoj.

- Eraro Pri Genaro Dank' Al Muŝo

Miksado ene de scienca datumbazo vivigis fajrojn pri kurado por konstrui karton pri Homa Genaro. Cetera Genomics, kiu ĵuse certigis pri sia laborfino rilata al sekvenco de Homa Genaro, neatente miksis homan genaran informaĵon kun tiu frukt-muŝa sur publika datumbazo.

- Energiaj Verdaj Ventoj En Teksas

Austin, Teksas. Generatoroj kiuj funkcias per vento, de antaŭlonge malakceptataj de publikaj servoj de Teksas, estas pretigitaj por eniri la ŝtatan energian merkaton nepensebla-skale de la erao de prezidento Reagen. □


• **La Libroservo de UEA en Interreto:** Kompleta katalogo de libroj, diskoj, kasedoj, vidbendoj, insignoj k.a. varoj vendataj de la Libroservo de UEA estas nun konsultebla en TTT ĉe www.uea.org/katalogo. Kun 4100 titoloj la sortimento estas senkompare la plej granda en Esperantujo.

En la reta katalogo oni povas serĉi librojn laŭ kategorio, titolo, aŭtoro, tradukinto kaj traduklingvo. Oni povas elekti la deziratajn varojn, kompilimendon kaj sendi ĝin al la Libroservo

de UEA, kiu tuj plenumos ĝin.

Ni avertas, tamen, ke la katalogoretpaĝoj estas tre konfuzaj, kaj povas esti ke multaj uzantoj ne sukcesos navigadi sukcese tra ili.

Tamen vi povas "elŝuti" (*download*) provizoran tekston de tiu katalogo, per la reto. Kvankam nekompleta, kaj listiganta la librojn kc. nur laŭ iliaj titoloj, uzantoj verŝajne trovos ĝin multe pli facile utiligebla. □



Parolas Brendan kun sia rabeno. "Post kiam mia familio vizitis min, mi ne plu povas trovi mian pluvombrelon. Kion mi faru, mi ja ne povas kulpigi iun el la familio."

Konsilas la rabeno: "Invitu la tutan familion, voĉlegu al ili el la Biblio. Legu la dek ordonojn. Kiam vi venos al 'vi ne ŝtelu', rigardu en la vizaĝon de ĉiu familiano, kaj vi tuj scios, kiu havas vian pluvombrelon!"

Elkore dankas Brendan. Dek kvar tagojn poste li reenkotas la rabenon, kaj plena de ĝojo li rakontas al li, kiuj okazis.

"Mi legis el la Biblio. Ĉiuj aŭskultis. Kiam mi venis al 'Vi ne deziru la edzinon de via najbaro' — mi tuj memoris kie mi lasis la pluv-ombrelon. [El *Tamen Plu*]

DIVERSAĴOJ

- **Folioj de Kat-Amikaro:**

Nun en sia sepa jaro, ĉi tiu kvarmonata revueto ĉarmas per siaj katfotaj kaj informas per siaj artikoloj. Ĝin nun redaktas Francisco Veuthey, bone konata nomo en la Esperanta revumondo. Kiu interesiĝas, tiu kontaktu Bob Felby ĉe:

esperantobob@picknowl.com.au.

- **Retadresoj:**

Korekto: Ken Rolls preferas ke oni uzu por li la ĉisekvan adreson: ken.rolls@esperanto.nu.

- **Pli da ekzamenistoj:**

Pro redakcia eraro, mankis en nia listo aperinta en la Majo-Junia numero de *ESK* la ĉisekva ekzamenisto:

WA: René Smeets, 70 Fairfield St, Mt Hawthorn 6016.

- **Sukcesis en la Supera Ekzameno:** Ruth Morrison (Qld). Ni gratulas.

- **Nekutima, nova KD: Herooj kaj martiroj de “Valsiginto”:**

Aŭdinte la esprimon “sona kompaktdisko” kvazaŭ aŭtomate venas en la kapon bildo de laŭta rok-muzika sceno. Tamen ekzistas ankaŭ aliaj, eĉ tre interesaj — kiel ekz. la antaŭnelonga KD: “Herooj kaj martiroj”, interesokapte prezentanta la Aŭstralian historion, la popolan kulturon en formo de rakontoj, versoj, klarigoj, kaj kantoj kun orekaptaj melodio.

“Valsigante Matildan”—la ĉefkan-
to de la disko aĝas 100-jarojn.

Kaj ĝi kaj la aliaj kantoj en bona Esperanto-traduko, kun la akompana scenaro, donas guston de la popola kulturo de la antaŭa jarcento de Aŭstralio.

La diskon preparis, reĝisoris, ko-

mpilis kaj produktis—kun helpo de Douglas P. kaj aliaj — Max Wearing. Al la disko estas aldonata eleganta, suplementa tekstlibreto. Gratulojn al la produktinto!

La disko estas havebla ĉe la eldoninto, interesiĝantoj turnu sin rekte al li:

Max Wearing, 30 Westbury Street, Hackney 5069, South Aŭstralia.

[Laŭ *Ret-info*]

- **Reaperas la bulteno *Brisbana Babilado*,** redaktata de Kay Andersen.

Ni bonvenigas ĉi tiun aldonon al nia regiona bultenaro. La redaktoron oni povas atingi ĉe:

[<kjand@ozemail.com.au>](mailto:kjand@ozemail.com.au).

- **Ne forgesu ke.....**

ankoraŭfoje kadre de la januara somerkursaro okazos la Aŭstralia Esperanto-Kongreso por la jaro 2001, kaj grava ero de ĝi estos la konkurso pri muzikpeco cele la Trofeon Fritz Mueller aŭ pri teatraĵo cele la ŝildo Herbert Koppel. Estos bone se ĉiu ŝtato prezentos almenaŭ pecon en ambaŭ kategorioj. La trofeo kaj la ŝildo ne ŝatas resti tro longe en la sama loko.

Do renkontu unu la alian, cerbumu, ĝuu la sperton kaj dividu vian amuzon kun la aŭskultantaro. Ĝis la scenejo en januaro 2001.

Franciska Toubale

- **AIS San Marino:** Eble ĉiuj scias kio estas AIS San Marino. Ĝi naskiĝis kun du celoj: roli kiel internacia scienca akademio, kiu faras kaj eldonas siajn esplorojn, kaj roli kiel universitato plurlingva, kun siaj profesoroj, siaj studentoj, siaj diplomoj, kun aparta emfazo al interfakeco kaj internacieco. En ĉi du taskoj la uzado

de Esperanto estas aparte emfazata, kvankam ĝi ne ekskludas la aliajn lingvojn. AIS ne estas, nek planas esti, Esperantista organizo. Aldoniĝis poste tria tasko, stimulata de du sinsekvaj UEA-prezidantoj: ke AIS krome estu la universitato de la Esperanto-komunumo.

AIS klopodas tiujn taskojn plenumi: diversaj verkoj (kelkaj en dulingva redakto), sciencaj kaj popularsciencaj, estis eldonitaj sub ĝia marko; la universitataj sesioj ĝis nun produktis pli ol 150 universitatnivelaĵojn kursojn en Esperanto (kiuj altiris centojn da studentoj el ekster la tradicia Esperanto-movado); plue, okazas AIS-sesioj dum la UK-oj kaj aliaj Esperanto-aranĝoj.

Pri la agado de AIS estas konsultebla la TTT-ejo <http://www.media-soft.it/ais> mastrumata de kol. Foessmeier, gaste ĉe la Teknika Universitato de Munkeno.

Sendepende de la juĝoj pri la oportuneco de tiaj celoj, pri iliaj praktika atingeblo kaj ĝisnuna efektiva atingo (pri kio tamen ĉiuj komentoj estas bonvenaj), AIS estas klopodanta kunmeti liston de universitataj docentoj kaj de universitataj kursfinintoj kiuj diversgrade konas Esperanton, eĉ nur pasive ĝis la minimuma kapablo povi pli-malpli kompreni skribitajn sciigojn.

[el <bja-listo@helsinki.fi>]

• Kontribuoj por libro dezirataj:

Ĉiu, kiu povas kaj volas skribi unu-, du-, tri- aŭ kvar-paĝan artikolon pri la temo “Kial mi estas Esperantisto” aŭ “Miaj travivaĵoj en Esperantio”, por esti ero de artikolar-libro, kies aŭtoroj estos Esperantistoj el diversaj landoj, bonvolu skribi al mi pri tio.

Mi ankaŭ intencas inkluzivi poezi-

on kies aŭtoroj estas geesperantistoj el pluraj landoj de ĉiuj kontinentoj. Mi volas nur poezion originale verkitan en Esperanto. Tradukaĵojn mi ne publikigos. La poezio devas ne esti jam publikigita en libro; sed ĝi ja povas esti jam publikigita en gazeto aŭ alia periodaĵo.

Biografieto de la aŭtoro akompanos ĉiun verkaĵeton, ekzemple: naskiĝ-jaro, lando aŭ etno, profesio, literaturo publikigita, landoj vizititaj, intereso, hobiaj, aktivado en Esperantio, ktp. Rimarko: Bonvolu sendi vian tekston antaŭ la lasta tago de julio, ĉar mi intencas publikigi la verkon aŭguste. Pli ol dek artikoloj jam estas pretaj por fariĝi parto de tiu verko. Adresoj: Pekim Tenório Vaz, Caixa Postal 182, Belém – PA, BR – 66017–970 Brazilo. E-poŝto:

[<vazpekim@amazon.com.br>](mailto:vazpekim@amazon.com.br)

(nur por simplaj mesaĝoj aŭ ne-aneksitaj dokumentoj). □

- **Hundamikoj:** *Bojado* estas multobligata gazeto por Esperantistaj hundoposedantoj kaj -amikoj. Kontakto: Pavla Zemanová, U Starého Mlýna 18/16, 10400 Uhriněves, Ĉeĥio.

[El *Esperantolehti*] □



LA DIKTATORECO DE LA ESPERANTO-VORTAROJ

de Marcel Leereveld



Estas necerte¹, do prid debateble, ĉu saĝa estis la ideo de Zamenhof ke la lingvo Esperanto kresku sammaniere kiel kreskas etnaj lingvoj.

Cetere, lia ideo pri ĉi tio parte estis sinkontraŭdira: ĝi enhavas la limigon ke supera instanco, nun la Akademio de Esperanto, diktatore deklaras oficialaj novajn vortojn, t.e. neologismojn (kaj eĉ novan klarigon de gramatikaĵoj). — sed tia diktatoreco praktike ne ekzistas en etnaj lingvoj. En ĉi lastaj, la “popolo” (t.e., nuntempe, precipe la ĵurnalistoj kaj la reklamistoj, sed ankaŭ la junularo) inventas, kaj tiel oficialigas, novajn vortojn. Neniu instanco havas la potencon kaj la aŭtoritation neniigi aŭ oficialigi tiun procedon.

La procedo vidiĝas speciale klare en la Angla lingvo, kiu nuntempe kreas multajn novajn vortojn, ofte necesajn, kaj preskaŭ ĉiam el siaj jam ekzistantaj vortojn. Tiel ĝi montras sin pli “Esperantisma” ol la nuna malkuraĝa Esperanto, kies adeptoj ĝenerale inventas novajn vortojn ne el sia propra vortkonsisto — kiel faras la kuraĝa kaj inteligenta lingvo Angla — sed malkuraĝe kaj malinteligente sklave ŝtelas siajn novajn vortojn el etnaj lingvoj (precipe el la Angla, pro ĝia nuntempa sed nature neeterna populareco, kaj el la Franca pro ties neimagpovaj Esperantistoj.

Tiu procedo vidiĝas ankaŭ en aliaj

Eŭropaj lingvoj, kiuj modeme ŝteladas vortojn el la Angla, kaj en ne-Eŭropaj lingvoj kiuj klopodas inventi, kelkfoje el siaj pralingvoj, novajn vortojn el sia propra vortkonsisto, kiel devus fari Esperanto.

La intenco de Zamenhof ŝajne estas demokrateca, kaj havas la sekvajn avantaĝojn:

1) Neologismojn ĉiu Esperanto-uzanto povas proponi kaj uzi.

2) La malnovaj oficialaj alternativoj, se ili ekzistas, ĉiam restos oficialaj, eĉ se neuzataj.

3) La Esperantistoj (ĉiuj el ili!) rajtas elekti, en sia uzado, la de ili plej ŝatatajn, t.e. ili povas elekti el aŭ ekzistanta vorto (radiko aŭ kunmetaĵo, kia “*malsanulejo*”) aŭ proponita neologismo (“*hospitalo*”, kvankam nun oficiala), aŭ ili povas elekti el diversaj proponitaj neologismoj por unu signifo (ekz. *komputatoro*, *komputero*, *komputoro*, *komputro*, ktp.). Tio ŝajnas tre demokrata, kaj similas al la disvolviĝo (*ne* necese pliriĉiĝo) de la etnaj lingvoj.

4) La Fundamentaj gramatiko (inkl. vortfaradon) kaj vortradikaro restas neŝanĝeblaj, ĝis supera ne-Esperantista aŭtoritatularo akceptos la bazajn ideojn kaj deklaras la oficialcon de Esperanto.

5) Ne-Eŭropanoj povas malpliigi la tencencan Eŭropecon de la Esperanta vortaro.

6) La Esperantistoj havas la povon, post perioda uzado de neologismo (ekz. *komputro*, *polui*, *hospitalo*), retroveni al la origina vorto Esperanta (*komputilo*, *polucii*, kaj eĉ for de ofici-

¹Ĉi tie, kaj en kelkaj aliaj frazoj, mi modifis la gramatikuzon de Marcel, por konformigi ĝin al la kutimoj de ESK. — Red.

aligita: *malsanulejo*).

La malavantaĝoj de la intenco Zamenhof'a estas:

1) Lingvisme nekapablaj (aŭ kompetentaj kelkfoje erarantaj, kiel ĉiuj) Esperantistoj povas krei neologismojn kaj novajn kunmetojn kiuj ne akordas kun la veraj signifoj aŭ kun ĝenerale aŭ Esperante lingvismaj reguloj kaj principoj (*ĝisi; resendi* por *retrosendi; far;* abs. inf.; *-iĝi* anstataŭ *ek-; krokodili; denove; korekta; sinmortigo; fare de; peri,* ktp.).

2) La Akademio de Esperanto povas esti nekompetenta por siaj oficialaj decidoj pro manko de kompetentaj Esperantologoj ĝenerale. Tio estis la kazo speciale en la periodo de 1960 ĝis 1988, kaj io simila okazis dum la Ido-krizo.

3) Eĉ se la Akademio decidus kompetente, tia decido estas deviga kaj aŭtokrata, kia cetera estas la Zamenhof'a *Fundamento de Esperanto*. Bonŝance la Akademio faris ĝis nun mal multe da decidoj. Sed la kuniĝo de demokrata disvolviĝo kaj nedemokratiaj *Fundamento* kaj Akademio (la anoj elektas siajn kolegojn) enhavas strangan kontraŭecon.

4) Ĉies libero rajti inventi novajn vortojn povas kaŭzi, kaj nuntempe efektive kaŭzas, ke la uzata lingvo kreskas grandege en kvanto da vortoj lernendaj. La Angla lingvo, en tiu aspekto pli inteligente uzata ol Esperanto, ne renkontas tiun problemon, ĉar ĝi ĝenerale uzas nur radikojn proprajn al ĝi. Aliflanke, la novaj Anglaj vortoj ofte estas formitaj aŭ uzataj kontraŭ la reguloj de ĝia propra gramatiko, kaj ofte kun mallogikaj signifoj. Tio okazas multe malpli en Esperanto.

5) La vortaroj povas tendence enhavi certajn neologismojn kaj lasi for

aliajn, same bonajn aŭ eĉ pli bonajn aŭ pli ĝustajn.

La Vortaroj

La Esperanto-vortaroj havas la plej maldemokratecan influon sur la lingvon, ĉar ili ne nur registras, sed elektas, favoras, kaj malfavoras. Etnaj vortaroj registras ĉiujn novajn vortojn, ĝenerale netendence ĉar senescepte. Ĉi lastaj celas nur registri kion la popolo uzas. La popolo ja rajtas, aŭ prenas la rajton, ŝanĝi sian lingvon kiel kaj kiom ĝi deziras. Ĉio estas akceptata kaj oficiala. La ŝanĝoj de la vortoj kaj de la vortsignifoj, kaj de la gramatiko estas karakterizataj de iliaj uziĝo kaj disvolviĝo. Plej ofte la ŝanĝoj kaj neologismoj estas nenecesaj, kosmetikaj, dependantaj nur de gusto kaj arbitro kaj hazardo, kaj ofte malobeas siajn antaŭajn regulojn gramatikajn. Pro tio, etnaj lingvoj estas nefideblaj kaj netaŭgaj kiel interpopolaj komunikiloj.

Esperanto estas, kaj devas esti por havi ekzistorajton, diferenca de la etnaj lingvoj. Do la Esperanto-vortaroj devas havi alian taskon: ili devas klare distingi inter la fidebla, oficiala, parto de la lingvo, kaj la arbitra, neologisma, (ofte signife aŭ gramatike malĝusta) parto de la lingvo. Ili ne tion faras. Ili krome elektas siajn favoratajn vortojn kaj signifojn. Etna vortaro ne kuraĝus fari tion, kaj ne povus fari tion, ĉar la popolo ne obeus ĝin. Sed en Esperanto oni rajtas kaj povas fari ĉion, kion oni volas, obeate kaj senpune. "Ĉiu stultulo povas klopodi kaj sukcesi".

Ni tamen devas distingi inter du specoj de vortaroj. La nur Esperantaj, kia estas *Plena Ilustrita Vortaro*, maldemokratece kaj ege influas la lingvouzon, sed neintence. Ilia dikta-

toresco konsistas en tio, ke ili ne klare distingas inter la oficiala lingvo kaj la multaj neologismoj, kaj krome ke ili ne klare indikas ke ĉiu neologismo estas nur propono, ne necese akceptinda. Pro tiuj mankoj la granda plejmulto de Esperanto-uzantoj malĝuste pensas ke ĉiuj en vortaro troviĝantaj vortoj kaj esprimoj estas uzindaj. Ili ne lernis distingi inter oficiala Esperanto kaj la multaj, ofte nenecesaj kaj mallogike formitaj, neologismoj. La manko de klara informado estas la krimo de tiuj vortaroj.

Pli kulpaj estas la fakvortaroj kaj la nacilingvaj vortaroj, speciale tiuj, kiuj precipe listigas regionajn aŭ dialektajn vortojn etnajn, kia ekzemple la tria eldono de la *Aŭstralia-Esperanta Vortaro*. Ĉi tiu klaso de vortaroj enhavas multajn neologismojn, ofte kreitajn de iliaj verkistoj kun la helpo de malgranda grupo de fakuloj aŭ nefakuloj.

La aroganteco de tiuj verkistoj estas kutime, kaj nature pro ilia interesiĝo, nekredinde forta. Ili pensas ke ili plej bone scias juĝi ĉu neologismo necesas kaj kian formon ĝi havu. Pro tiu aroganteco ili neniam, krom kelkaj sanaj esceptoj, substreke klarigas al la legantaro ke iliaj neologismoj estas nur proponoj, ne necese plej bonaj kaj uzindaj.

Ili enkondukas sian, ofte grandegan, verkcreaĵon kiel la normon sekvendan de la Esperantistaro. Ili kredas ke ili reprezentas kaj rajtas reprezenti la spertulojn en ilia fako kaj ke la ordinara Esperantistaro ne kapablas juĝi. Ili diktatoras ne nur ĉar ili misuzas la fidon de la “popolo”, sed ankaŭ ĉar ili insistas ke iliaj juĝoj estas akceptendaj.

Tian procedon Zamenhof ne antaŭvidis. Tre demokrataca mem, li aten-

dis ke la verkistoj kaj la popolo sen menslavado, sen mensdirektado, juĝos kaj pridecidos la akceptindecon de neologismoj, tute demokrate. Sed kiom ofte, eble 99%-e, oni aŭdas la esprimon: “Ho, la vorto estas en *PIV* (aŭ en alia vortaro), do mi povas uzi ĝin”, signifantan ke la vorto estas la ĝusta, la akceptita, kaj la uzenda.

La kompatinda ŝafaro, heteroadoranta en Esperantujo same kiel ĝi kutimas en sia socia vivo, nekritikante akceptas ĉion, kion al ĝi engorĝigas la famuloj kaj la sirajtiguloj. Se ĉi tiuj estus centprocente kompetentaj pri Esperantologio (kiu estas?), la afero eble ne danĝerigus, kvankam tamen mankus la memkreado ate de la ordinara Esperantistoj.

Sed ho ve! Kiel la malforta Esperantologia talento inter la Akademianoj montras, ni devas ne tro fidi la kompetenton de la vortaristoj.

Unu el la kaŭzoj de la manko de vortarista talento kaj de ilia diktatoreco estas la misa kompreno de la evoluo de la lingvo Esperanto, nome ke ĝi devus evolui sammaniere kiel etnaj lingvoj, do ke logiko malpli gravus ol gusto kaj ŝanĝademo. Alia kaŭzo estas ke niaj instruistoj montras la lingvon kiel studobjekton simple lernendan sen kritiko, dum plenkreskaj lernantoj povas kaj devas lerni rekrei Esperanton same kiel ĉiuj antaŭaj (inkl. Zamenhof) faris, sur la bazo de la *Fundamento* kaj per la helpo de grandskala vortfarado.

Se ĉi tiu estus la normala procedo, la lernantoj lernus fidi nenion antaŭ ol mem juĝi la (mal)ĝustecon. Nur tiam la revo de Zamenhof, ke Esperanto apartenu al ĉiuj uzantoj kaj ke ĉiuj demokrate pliriĉigu la lingvon, efektiviĝos, sen la diktatoreco de niaj vortaristoj. □

RAPORTO DE LA ESTRARKUNSIDOJ DE NZEA

raportas Dennis Pease

La estraro kunsidis jam 3 foje en la nuna jaro, je la 11a de marto, la 8a de aprilo kaj la 15a de majo. Jen resumo de la aferoj pritraktitaj en la 3 kunsidoj.

1) En marto, S-ro B Fox (komisiito pri Oceanio) informis la estraron pri propono ke S-ro Paŭlo Desailly, bone konata Esperantisto kaj ano de la Bahaa kredo, iru al Samoo por propagandi kaj instrui Esperanton dum 3 monatoj. Li bezonus monon por siaj elspezoj kaj post diskutoj kun AEA, S-ro Fox proponis ke NZEA pagu trionon de la kosto kaj AEA pagu du trionojn. La proksimuma kosto estus inter \$1200 kaj \$1600. La estraro konsentis al la propono ke NZEA pagu trionon de la kosto ĝis \$1000. En aprilo, Paŭlo ĉeestis la kunsidon kaj informis nin pri siaj planoj por agado en Samoo. Li planas baldaŭ flugi al Samoo kaj resti ĝis la 8a de julio. En majo, S-ro Fox raportis ke Paŭlo havas kelkajn lernantojn kaj eĉ trovis taŭgan personon daŭrigi la instruadon post sia reveno. Li ankaŭ vizitis Usonan Samoon por enkonduki nian lingvon.

2) S-ro B McDonald prezentis simplan agadplanon kiun li kompilis el la strategia plano. Ĝi temis pri reklamado, helpo por la E-kluboj kaj la buĝeto. Oni decidis starigi subkomitaton de 3 personoj: B. McDonald, J. Fox kaj D. Pease, por prepari buĝeton. En majo S-ino J Fox rekomendis ŝanĝon al la propono ĉar ŝi opiniis ke oni ne povus prepari buĝeton antaŭ ol oni fari agadplanon. Post diskuto la tasko de la subkomitato fariĝis

prepari agadplanon kun celoj, limdatoj kaj nomoj de personoj kiuj respondecus pri la celoj. S-ino M Bax konsentis anstataŭi S-inon B Fox en la subkomitato.

3) La estraro serĉis taŭgan lokon por jarkunsido aŭ kongreseto en la jaro 2001. La Mastertona Klubo ne povas aranĝi ĝin kaj kvankam eblas okazigi ĝin en Hamilton, oni finfine decidis ke ĝi okazu en Auckland de la 5a ĝis la 7a de januaro.

4) Problemo pri kvorumo ĉe la lasta jarkunsido instigis la estraron konsideri ŝanĝojn al la reguloj de la Asocio. S-ro D Dewar ellaboris amendojn kaj la estraro konsideris ilin en majo. Tamen, ni prokrastis decidon pri la afero ĝis junio por ke la estraranoj havu tempon pli detale pripensi ilin. Post interkonsento ni sendos la proponitajn amendojn al la membraro kiuj povos decidi la aferon en la venonta jarkunsido.

5) NZEA mendis pliajn 10 ekzemplerojn de la libro *Esperanto, Learning and Using the International Language* de D Richardson. La asocio sendos ekzemplerojn al publikaj bibliotekoj en Karori, Invercargill, Hastings kaj Masterton.

6) En Aprilo la Estraro preparis kaj elsendis nian bultenon *Arĝenta Filiko*.

7) S-ro B Fox fariĝis ano de la Fratuleca Komitato.

8) S-ro B Fox raportis ke S-ro D Broadribb afable konsentis aranĝi la eldonadon de la *Australasian-Esperanto Dictionary* post la malsukceso de la antaŭa aranĝo.

NZEA Kongreseto 2001

NZEA komencis plani kongreseton en Auckland de 5a ĝis la 7a de januaro 2001. Ĝi eble okazos en la Parnell Community Centre kaj ni jam provizore mendis ĉambron tie. Kvankam ne estos plena kongreso kiel en Wellington, ni anticipas ke okazos la kuti-

maj paroladoj, distraj aferoj kaj eble duontaga ekskurso. Kompreneble, gravaj aferoj kiel la jarkunsido de la asocio okazos en la kongreseto. Plaĉus al ni ricevi sugestojn, komentojn aŭ programerojn. Bonvolu sendi ilin al Bradley McDonald aŭ alia estrano. □

IEI 70-JARA**de Atilio Orellana Rojas**

La 24-an de majo 1930 Andreo Cseh kune kun gesinjoroj Isbrucker fondis la Internacian Cseh-Instituton de Esperanto en Nederlando.

Tiam la celoj de la Instituto estis vortigitaj tiel: “disvastigi Esperanton pere de Cseh-metodaj kursoj, prepari taŭgajn instruantojn, helpi ilin kaj la kursaranĝantajn Esperantistajn organizaĵojn per la necesa instrumaterialo kaj konsilado”.

La unua Direkcio estis plenumita de Andreo Cseh mem kaj de Julia Isbrucker kaj ĝi havis konsilantaron konsistantan el gravaj personoj de la tiama Esperantio, kiaj Edmond Privat, Felix kaj Leono Zamenhof, ktp., kaj estis samtempe starigitaj sekretariejoj en Estonio, Hungario, Latvio, Nederlando, Norvegio kaj Svedio.

La unua agado de la Instituto estis organizi Pedagogian Seminarion, kiu ĉeestis 200 personoj el 20 landoj, kaj fine de ĝi la grupo karavane vojaĝis al la UK en Oksfordo.

Andreo Cseh disvastigis la metodon, kiu poste famiĝis en la Esperantomondo per la nomo de ties iniciatinto. En la 30-aj jaroj la Instituto kalkulis je aro da 300 diplomitaj Cseh-instruistoj, kiuj vojaĝadis instruante la lingvon: Julio Baghy, Lidja Zamenhof, Erika kaj Henrik Seppik, Lizzie

kaj Tiberiu Morariu, Carl Stop-Bowitz, kaj multaj aliaj.

En decembro de 1933 la Instituto akiris sian propran sidejon en la urbo Den Haag, kaj ĝis hodiaŭ ĝi funkcias en la sama loko. La inaŭguron ĉeestis lokaj gravuloj, kiaj la skabeno pri instruado en Den Haag, reprezentanto de la Nederlanda ministro pri instruado, ktp.

En la jaro 1952 la Instituto ŝanĝis sian nomon al Internacia Esperanto-Instituto (IEI).

Jam pasis 70 jaroj de vivo de IEI. En tiu periodo ĝi abunde agis en diversaj kampoj. Certe la Cseh-metodo estas la plej konata metodo en Esperantio. IEI nuntempe kalkulas je diplomitaj Cseh-instruistoj en kvin kontinentoj kaj ili prizorgas la vivadon kaj aktualan uzon de la metodo.

En la eldona kampo IEI montriĝis jam de tiuj fruaj jaroj kun eldonaĵoj kiaj *La libro-konstantaĵo de fila pieco aŭ Karlo*, *La lernolibro de la vivo*, *La centa simio*, *La alia pasinteco*, ktp. Certe la plej grava estas la verko *Baza Cseh-Kurso*, unuafoje eldonita en tiu frua periodo kaj kiu jam atingis sian 8-an eldonon; la alia elstara aperintaĵo estas la instrufilmo kun

¹Deputy mayor

ties apoga materialo *Mazi en Gondolando* lanĉita okaze de la centjara datreveno de Andreo Cseh en 1995. Inda je mencio estas ankaŭ la aperado de la revuo *La Praktiko*, kiu dum jaroj estis la ĉefa ligilo por la Cseh-instruistoj kaj taŭga lernomaterialo por la lernantoj en la Cseh-kursoj.

IEI daŭre organizas kursojn por lerni la lingvon, kaj metodikajn seminariojn por eduki novajn instruistojn

en la uzado de la rekta metodo. Ĉiujare deko da Seminarioj okazas en la mondo, en kiuj la instruistaro povas ricevi tiun fakan scion. IEI ankaŭ okazigas specialan trejnadon por gvidi Seminariojn pri la Cseh-metodo.

IEI, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag; Nederlando. Retadreso:

iei001@worldonline.nl [Laŭ *Ret-info*]

NE NUR POR LERNANTOJ!

de Jennifer Bishop

La 17a Australia Somerkursaro, 13-21 de januaro 2001 en Melburno, alvokas ankaŭ instruantojn de Esperanto kiuj ŝatus oportunun komenci diplomkurson pri instruado laŭ la Cseh-metodo. Por nesciantoj, la bazaj principoj de la instrumentado estas: fremdlanda instruisto, senlibra kaj paroliga instruado. La metodo estis detale elpensita kaj preskribita de Andreo Cseh el Rumanio, en la 1930-aj jaroj. Pro lia sukceso estis fondita en Hago, Nederlando, la INTERNACIA ESPERANTO INSTITUTO por evoluigi la instrumentadon per trejnado de instruistoj.

La tuta diplomkurso konsistas el tri seminarioj: "A" - enkonduka, "B" - pliprofundiga perkoresponda, "C" - diplomiga kun praktika ekzameno. Dum la somerkursaro, krom la kutima kursaro kvarnivela eblos ĉeesti ankaŭ kontraŭ krompago de \$20 la Cseh-seminarion "A". Posttagmeze partoprenantoj rigardos la lecionojn de Prof. Gu Jian-hua, diplomita kaj sperta instruistino el Ĉinio, kiu instruos al novaj lernantoj. Sekvos dis-

kutado pri la lecionoj kaj pri la Cseh-metodo ĝenerale, kaj ankaŭ pri la fundamentaj principoj priskribitaj en *Baza Cseh-Kurso*. Je la fino de la semajno, diplomigontoj prezentos 5-minutan provlecionon al siaj samseminarianoj.

ILEI planas estontan profesi-nivelan ekzamenon por instruistoj de Esperanto, sed nuntempe la nuran eblecon ekzameniĝi pri instruado proponas IEI laŭ la Cseh-metodo. Tial mi volas kuraĝigi ĉiujn interesatajn instruantojn kiuj jam sukcesis je la meznivela ekzameno de Esperanto, kaj kiuj bone regas la lingvon, partopreni la "A" - seminarion. Eĉ se vi ne intencas fini la kurson, vi multe profitos per la diskutado pri la karakterizaj ecoj de la metodo kaj la praktikado, instruhelpiloj ktp. Unue vi bezonos atente legi *Baza Cseh-Kurso*. En Aŭstralio tiu libro estas havebla de mi kontraŭ pago de \$20 inkluzive sendokoston.

Adreso: Jennifer Bishop, 39 Hill Street, Hawthorn Vic 3122. Rete: jenny.bishop@education.monash.edu.au

EL LA REGIONOJ

QLD: Dum la 2-3a de majo Wojciech Zbik visitis Brisbanon kaj gastis kun Kay Andersen. Li kaj la familio miris al Adelajdo el Pollando antaŭ ok jaroj. Li finis studojn en la Universitato; antaŭ ol serĉi postenon li deziris iomete vojaĝi. Do li unue vizitis ĉi tie, poste li iris al Sidnejo. Li flue parolas Esperanton.

Je la 6a de majo, kvin membroj renkontis Korean vizitanton, Sue. Ŝi nun estas en Brisbano por unu jaro, por studi la Anglan. Ŝi deziras ekkoni Esperantistojn ĉi tie, kaj esti membro de nia rondo dum sia restado en Brisbano. Do, ĉe Sunnybank Plaza ni trinkis kafon kun ŝi kaj babiladis.

Je la 8a de majo, tri membroj renkontis vizitanton el Anglio, Beatrice Clarke. Ŝi vizitas sian fratinton kiu loĝas en Nerang. Beatrice prenis trajnon al Brisbano; ni kune trinkis kafon ĉe South Bank. Beatrice rakontis al ni ĝisdatan informon pri la Esperanto-movado en sia lando. La Esperanto-Asocio de Britio ne plu havas oficejon en Londono. Ĝi nun starigas Esperanto-Centron en la Kolegio Barlaston, apud Stoke-on-Trent.

[El *Brisbana Babilado*]



Harold Lietz, Eric Bantick, kaj Brian Siley

En Glenorchy (Hobart) ekspoziciis pri Esperanto du Esperantistoj (Lietz kaj Bantick) kaj amiko.

ANONCO PRI VENONTA KONFERENCO

de Bradley McDonald
**Association for Baha'i Studies
 Conference in New Zealand**

Ĉi-jare la 15an kaj 16an de julio la NZ Association for Baha'i Studies in New Zealand okazigos konferencon en Hamiltono ĉe la Universitato de Waikato. La dutaga programo estas aranĝota de la Centre for Continuing Education — Waikato University kunlabore kun la NZ Association for Baha'i Studies. La konferenco temo estas “Models for an Optimal Society” [“modeloj por optimuma societo”]. Unu el la du ĉefaj temoj por la unua tago (sabato) estas “Peace and Conflict Resolution” [Paco kaj solvado/ĉesigo de konfliktoj]. En la posttagmeza parto de la programo kvar diversaj parolantoj parolados kadre de tiu temo. Inter la kvar estos Bradley McDonald, kiu pritraktos: “International Language as a Tool for Peace” [“Internacia lingvo kiel pacigilo”]. Kompreneble li klarigos kaj argumentos favore al la akcepto de Esperanto. Tri aliaj Bahaanoj siavice parolos pri “World peace — A possibility or a Pipedream” [“Mondpaco — ĉu vera eblo aŭ nur revo?”]. “Speech — Its Role in Creating a Culture of Peace” [“Parolo — ĝia rolo en la kreo de kulturo de paco”], kaj “Conflict Resolution” [“Solv(iĝ)o de konfliktoj”]. La dimanĉa programo inkluzivos erojn en du apartaj fluoj, t.e. du ebloj ekzistos por la ĉeestantoj: La unua, kiun enkondukos Esperantisto, Dr Paul Friedman, pritraktos temojn rilate al virinoj, romantika amo, kaj projektoj por soci-disvolviĝo. La alia inkluzivos erojn laŭ temoj kiaj: etiko,

edukado, kaj muziko.

Ni substreku ke la programo estos Anglalingva, la etoso certagrade spirita — en tio ke ĝenerale la sesioj baziĝos sur temoj kiaj paco, celado por optimuma socio, la laboro de volontuloj en la socio, la spirita bazo de ekologio, etiko, egaleco de viroj kaj virinoj, vilaĝoj de la estonteco. Estos eĉ (por la Novzelandanoj!) ero nomita: “Greet the Funk with My Mauri”... temas pri “A Spiritual Approach

to Hip Hop in Aotearoa”. La plejmultaj, sed ne ĉiuj, paroladontoj estas Baĥaanoj. Inter ili, el Usono, Dr. Dorothy Marcic, kiu estas la aŭtoro de la libro *Managing with the Wisdom of Love*.

Por pli da detaloj oni povas turni sin al Centre for Continuing Education, University of Waikato, Private Bag 3105, Hamilton 2020, N.Z. La kosto por unu tago (inkluzive de lunĉo kaj du tepaŭzoj) estas ĉ. \$25.

LA MANIFESTO DE RAŬMO

La Manifesto de Raŭmo, kreita dum la IJK en 1980 en Raŭmo en Finnlando, estas la fonto de raŭmismo, precipe praktikata de la rondo ĉirkaŭ Literatura Foiro, sur kies paĝoj raŭmismo estas multe diskutita kaj evoluigita. La tekston aŭtoris ĉefe Jouko Lindstedt kaj Giorgio Silfer, sed ankaŭ Amri Wandel kungvidis la dumkongresan seminarion sur kies prelegoj ĝi baziĝas.

1. Krizo de identeco

La subskribintoj konstatis kontraŭdiron en la sinteno de la Esperantistaro, kvazaŭ konflikton inter idea superego kaj egoo: nia superego igas nin prediki al la aliaj homoj pri kelkaj mitoj — la dua lingvo por ĉiu; la Angla lingvo estas nia malamiko; UN devas adopti Esperanton; ktp — kaj laŭdegi la lingvon eĉ neobjektive okaze de intervjuo; samtempe, inter ni, ni ĝuas kaj aplikas Esperanton laŭ tio kio ĝi efektive estas, sendepende de la praelaj sloganoj. Tio ja estas krizo de identeco, kaj ni sentas la neceson motivi nian Esperantistecon per io pli kohera.

2. Kritiko de prceloj

Ni kredas ke: a) la oficialigo de Esperanto estas nek verŝajna nek esenca dum la 80-aj jaroj — oni havu alternativajn celojn; b) la faligo de la Angla lingvo estas nek tasko nek zorgo de la Esperantistoj: finfine la Angla rolas nur kiel helplingvo, analoge al la franca siatempe (eĉ malpli grave ol iam la franca mem); Zamenhof neniam proponis al la E-movado kiel celon kontraŭstari la francan, ĉar por Esperanto li antaŭvidis pli valoran alternativan rolon.

3. Niaj celoj

Ni celas disvastigi Esperanton por pli kaj pli, iom post iom realigi pozitivajn valorojn:

- a) propedeŭtiko por lingvoinstruado;
- b) kontaktoj inter ordinaraj homoj;
- c) kontaktoj sendiskriminaciaj;
- ĉ) novtipa internacia kulturo.

Lige kun la lasta valoro, ni emfazas ke la serĉado de propra identeco igis koncepti Esperantistecon kvazaŭ la apartenon al mem elektita diaspora lingva minoritato. La kresko de niaj fortoj kaj la aliĝo de novaj ho-

moj estas nepre kondiĉitaj de la kondiĉo pri tiuj ĉi valoroj.

4. La kongresoj

kiel vojo al kresko Internaciaj kongresoj kaj renkontiĝoj estas esencaj por la asimiliĝo de homoj al nia lingva komunumo: necesas unuflanke kongresi pli ofte inter ni, kaj rezervi la kunsidadon de gvidorganoj al apartaj funkciulaj kunvenoj, laŭ la modelo de la TEJO-seminario en Strasburgo (junio 1980), kaj aliflanke necesas

fortigi la uzon de Esperanto kiel laborlingvo en fakaj konferencoj internaciaj, laŭ la modelo de la Freinet-instruistoj.

5. Ni posedas formon kaj enhavon Ni kredas ke la unua jarcento de Esperanto pruvis la taŭgecon de la lingvo por esprimi ĉion; meze de la 80-aj jaroj, komence de la dua jarcento, ni devos ekmontri al la mondo ke ni kapablas ankaŭ diri ion — ion kulture originalan kaj internacie valoran. □

Renkontas maljunulino feinon, kiu konsentas plenumi tri dezirojn.

“Mi ŝatus havi multe da mono, kara sinjorino feino”, ŝi diris.

Tuj la tuta ĉirkaŭaĵo estis plena de monbiletoj kaj moneroj, kelkaj eĉ el oro.

“Nun plaĉus al mi ree esti juna kaj bela fraŭlino”, ŝi diris.

Tuj ŝi fariĝis belega junulino.

“Plaĉus al mi ke mia maljuna kato fariĝu bela juna viro,” ŝi diris.

Tuj staris antaŭ ili belega junulo kiu diris: “Ĉu vi nun ne pentas ke antaŭ du semajnoj vi kastrigis min?”

[El *Tamen Plu*]

MIA KOMENTARO

de *Edlo Bokserp*

Nia reaktoro petis, eĉ insistis, ke mi partoprenigu vin en la profunda saĝeco kiun mi de tempo al tempo disdonas al personoj dezirantaj ĝin legi. Mi protestis, kompreneble, ĉar mia kvanto da saĝeco estas severe limigita, kaj mi ne volas elverŝe malŝapri ĝin senbezone. Sed ordono farita de nia Reaktoro ja estas malfacile kontraŭebla, sciu; kaj krome, li bezonas ian tekston por plenigi la spacon ĉi tie sur la pasta tekstopaĝo. [Ĉu mi diris “pasta”? Mi celis diri “lasta”, sed ja vere mia stomako ankaŭ protestas... Nu, mi ne longe mankas en la kuirejo, nun, ĉar la spaco estas jam preskaŭ tute plena. Do mi devos rapide diri al vi mian hodiaŭan eron da saĝeco:

Kiu silentas, tiu ne diras malveraĵojn. Do tiun fidu.

LA AŬSTRALIA KAJ LA
NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

Prezidanto: *Ron Gates*, Wangarangi, MSF 2001, Armidale NSW 2350.

☎ kaj faksilo: (02) 6772 3856.

rgates@metz.une.edu.au

Vicprezidantoj:

Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014.

vpayne@cygnus.uwa.edu.au

Jenny Bishop, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122.

jennybishop@education.monash.edu.au

Sekretario: Bob Felby, 6 Dorset St, Semaphore Park SA 5019.

☎ (08) 8242 1460.

esperantobob@picknowl.com.au

Kasisto: Margaret Inglis, 4 Mayfield Drive, Mt Waverley Vic 3149.

☎ (03) 9807 8589.

minglis@netspace.net.au

Vickasisto: Dianne Lukes, c/o Post Office, Meringandan Qld 4352.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

Prezidanto: Bradley McDonald, PO Box 12 103, Auckland 1135.

☎ 09 579 4767, faksilo 09 579 1070.

neelam@voyager.co.nz

Sekretario: Howard Gravatt, PO Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035, New Zealand.

☎ 09 626 6129.

hgravatt@ihug.co.nz

Kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035.

☎ 09 817 8244.

brianandjackie@abztrak.co.nz

KOTIZOJ:

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

AŬ\$30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al la Kasisto de AEA: Margaret Inglis, 4 Mayfield Drive, Mt Waverley Vic 3149.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

NZ\$40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

Unuopaj ekzempleroj de *Esperanto sub la Suda Kruco*: Por membroj, AŬ\$3 + poŝtsendkosto; por nemembroj, \$4.25 + poŝtsendkosto. Mendu de la Libroservo de AEA.

Abonoj ekster Aŭstralazio: En Usono kaj Kanado: US\$26. Mendu ĉe ELNA. Aliaj landoj: €23.70, pagu al la konto ael-w de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 2000 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas © 2000 de la Aŭstralia kaj la Novzelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de *ESK* estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb per iMac DV SE, la programo uzita estas FrameMaker. La tiparo uzita estas New Century Schoolbook. La reteldono estas preparata per Power Mac 7200, kaj Acrobat.

RESULTS OUR TRANSLATION CONTEST

report by Donald Broadribb

Nine entries were received for the Translation Contest published in the *English Supplement* of our May-June issue. The entrants were, in alphabetical order:

Henry Broadbent
Bob Felby
Hazel Green
Bradley Kendal
Terry Manley,
Dudley Parkinson
Franciska Toubale
J.D. Whitmore
Sid Wolifson

The translation was a difficult one, and we congratulate all the entrants for their efforts. The winning translation was submitted by:

Hazel Green

to whom the winner's prize has been sent. All other entrants have been sent the book promised as an incentive to enter the Contest.

The text to be translated contained a number of difficult terms and phrases, and we were encouraged to see the ingenuity of our contestants in attempting to put these into good Esperanto. Below are some of the more difficult items, with comments.

The title of the text, itself, contained a difficult play on words: "Our Amazing Brain Driving Us Along", in which "Driving us" might be translated in a variety of ways for this particular context. Among the suggested translations submitted were *Nia mirinda cerbo pelanta nin*, *Antaŭen puŝas nin nia miriga cerbo*, *La mirinda homa cerbo aŭtogvidanta*, *Nia miriga cerbo kondukigas nin*, *Nia mirinda cerbo veturigas nin*, *Niaj mirigegaj cerboj irigantaj nin antaŭen*, and *Nia miriganta cerbo puŝas nin antaŭen*. Two entries did not translate the title. Also, the original author of the text proposed as his own translation *Nia miriga cerbo nin veturiganta*. Each of these translations has something to commend it. I personally like the first two best, as they give something of the flavour of the English original wordplay. While *kondukigas* can be justified gramatically, in this context, and does retain some of the original wordplay, I feel it has a less smooth feel than my two particular favourites.

“Super computer” was a term which was variously rendered. While most preferred to translate it as *superkomputilo*, which is in fact the most common term in general Esperanto use, I felt the translation *komputegilo* proposed by one of the contestants to be not only excellent in expressing the true flavour of Esperanto compound word formation, but highly expressive as well and a great deal preferable to the English derived “superkomputilo”.

The term “lane”, as in a multi-lane highway, is an interesting test of ingenuity, in that few of our writers are accustomed to writing about traffic in Esperanto. Proposed were *vojstrio*, *vojdivido*, *strio*, *vico*, *kolumno*, *viclinio*, *leno*, *trafikvoĵeto*, *voĵeto*, *vojparto*, *irejo*. Two contestants also suggested the word *leno*, a loan word from English (following the now fashionable fad of transcribing loan words from English by sound instead of spelling), which is proposed in Benson’s Dictionary. None of these is totally satisfactory, I feel. The “traditional” term, *koridoro*, which is listed in Benson as well as in the current *PIV* is, I think, a better choice.

“Power steering” was also a very difficult term for all our participants. They proposed variously *sistemo de forta stirado*, *la motoro asistas la direktilon*, *stirilo permotorohelpata*, *potenca stiro*, *potenc-guidilo*, *potenca stirado*, *potencstirilaro*, *povstirado*. Marcel himself proposed *potencdirektado*. One entrant, perhaps wisely, circumvented the problem by rephrasing the text: [*Se nia aŭto*] estas eĉ tre facile direktebla. I am not terribly impressed by any of these. As I understand it, power steering is aided not by the petrol engine but by the an electric motor. *Povstirado*, *potencstirilaro*, *povstirado*, *potencdirektado*, and the like seem like Anglicisms which many Esperantists would find difficult to understand. Benson is of no help on this, nor is *PIV*. Possibly *perelektre helpata stirado/direktado* might be a usable paraphrase, though extremely cumbersome.

“Traffic signals” is another difficult term, given that *lumo*, *lumilo*, *lampo* are highly ambiguous as to whether they refer to headlights on the car, lights on poles to illumine the road, or traffic signals. One person proposed *semaforo*, which is the term given for the meaning of “traffic signals” by *PIV* and also by Benson. *Semaforo* for “traffic signals” is, of course, taken from nautical usage where it refers to signal lights on a mast.

For “headlight” Zamenhof proposed *reflektoro*, so this term came into Esperanto almost simultaneously with the appearance of cars on the road. It is useful to distinguish between *reflektoro* and the many other lights used in motor traffic, such as to light up the dashboard (*panelo*, or much more

simply, *indikiltabulo*), warning lights (*avertolampoj*, *avertsignoj*) that notify the driver of oil problems, overheating, etc., and the overhead light inside the cab that allows the lost driver to read a map!

The majority of entrants misunderstood the phrase “We also consider whether we should reopen the airstream from outside, if we have closed them [sic!] because of excessive exhaust fumes from the cars in front”. The reference is not, as many entrants assumed, to windows but to the air intake system usually regulated by controls on the dashboard. Marcel proposed for this: ...*ĉu ni devas remalfermi la eleksteran aerfluon, kiun ni ĉesigis veturante malantaŭ veturilo eldonanta tro multe da elirgasoj*, which is clear and easy to understand. Another suitable translation proposed by one of the entrants reads: ...*ĉu [oni] ree lasu eniri aeron el la ekstero, se oni malfermis la aerfluon pro tro da malpura aero el la eltirejo de antaŭaj aŭtomobiloj*.

“Nerve cells at the back of our eyes” stumped some of the entrants, who failed to realize that these nerve cells are not *behind* (*malantaŭ*) the eyes but a part of them. Marcel proposed *la nervĉeloj* [or *nervfinaĵoj*] *en la malantaŭo de niaj okuloj*, which is both grammatically and anatomically correct. A few of the entrants also proposed minor variations of this. One entrant wrote *okuldorsnervĉeloj*, which though a mouthful is also grammatically and anatomically correct. *Optikglobuloj* was an interesting suggestion by one writer, but *globulo* refers to quite a different sort of cell, such as a blood cell.

Writers in Esperanto are frequently careless in distinguishing between the various intensities that “darkness” takes, and thus miss out on the many nuances that Esperanto can express for this concept. *Mallumo* implies a total lack of light, which is in fact never found on the Earth’s surface. *Malhelo*, which turned up in some translations, is a much better term for the conditions when we must navigate by moonlight, starlight, or other weak lighting conditions. “Dark” can variously be expressed as *malluma*, *neluma*, *senluma*, *nehela*, *malhela*, and various other terms relating to the intensity of light or the lack thereof.

“Rear view mirror” posed a major difficulty for most of the entrants, who were misled by the English expression. In reality, all mirrors look backwards, and show a “rear view”. *Retrospegulo* is a rather meaningless term in Esperanto. In the text under consideration, in most, if not all, instances simply *spiegulo* is enough, amplified by *eksteraŭta* or *interna* or some other similar term as needed.

“Flat tyre” also led to some interesting suggestions. *Subita malŝveliĝo de pneŭmatiko*, or simply *malŝvelo de pneŭmo* were both good proposals. (*Pneŭmo* is a reasonably popular abbreviation of the rather unwieldy term *pneŭmatiko*.) Also proposed were *pneŭmatika krevo*, which is good. *Subita altera pneŭmatiko*, which one entrant suggested, would work in the context but could be problematical. *[La] radbendo ekmalpleniĝas* is actually a very good descriptive translation, as are *[akiri] senaeran pneŭmatikon*, *subita senaera radbendo*, and *sen pneŭmatiko senaeriĝas subite*, proposed by various persons. Marcel proposed *subita senaera pneŭmatiko* or *pneŭmatikmalpleniĝo*, both of which are variants on the same theme.

The “fine art” of driving brought us *subtila arto*, *bela arto*, *fajna arto*, *belarto*, *funda scipovo*, and *subtila kapablo*. I have some reservations about *belarto*, which is usually used to refer to literature as a branch of the arts. Marcel’s *delikata arto* gets my acclaim, though the other suggestions have much to commend them.

“Safe” is a difficult word to translate. *Sekura* is cognate with our English word “security”, whereas in the text to be translated “safe” generally means “not posing a threat”, “not dangerous”. Some of the entrants wisely chose *sendanĝera* or variants of that term, for this meaning. “Safe distance” is really *sendanĝera distanco*, as most of the entrants realized.

“Accident prone” mostly became *akcidentema*, or minor variations of that, which is a very good translation for the concept.

Most of the entries were quite good in grammatical structure, though a few very common errors could be noted: *ŝanĝ-* is a transitive verb, and when a situation “changes” it therefore *ŝanĝiĝas*.

The double meaning of *krom*, which Marcel has often pointed out in these pages, tripped up several of our entrants, since it most commonly is taken to mean “as well as”, and must be used with great caution to translate “except for”. Mostly *escepte de* is required as a translation for “except”, and *krom* should be used only if the meaning is obvious from the context — which very often it is not.

All things considered, however, all nine entrants made a good effort to translate a text which contained many pitfalls, and must be congratulated for their work. May their future writing in Esperanto live long and prosper, as Spock might say.